

Budhisma Terminaro (el "La Budhismo")

Amido (*Amida, Amitabha*). La Budho de senlima Lumo. La kvara el la ĵanaj Budhoj¹ (*Dhyani, Jhani*). La personiga prezento de perfekta kompato. Al la purlanda Skolo de Ĥinlando kaj Japanlando, Amido estas simbolo la peranto inter la Realo kaj la homaro, kaj, pro la fido al li, oni renaskiĝos en Lia paradizo. Esotere tiu ĉi simbolo signifas, ke Amido estas la Lumo de la Realo; kaj renaskiĝo en lia paradizo signifas la vekigon de la Lumo de Saĝeco en la homo.

Anata (*Anatta*). Unu el la tri ecoj de ekzistado; la doktrino de ne-ego, kaj la ne-aparteco de la vivo.

«En ĉiu estas anateco.» Aplikata al la homo ĝi signifas, ke aparta memo aŭ ego ne ekzistas en la kvin komponitaĵoj, el kiuj la homa persono konsistas. La Budho diris: «Formetu tion, kio ne estas vi: la korpon, la sentojn, la mensajn ecojn, la mem-konscion.» La nea flanko de la doktrino montras, ke en la kvin komponitaĵoj mem ne ekzistas eterna kaj aparta individueco; dum jesaflanke ĝi montras, ke per laŭiro de la Nobla Okera Vojo la unueco de ĉia vivo estas konstatota. Efektivigita en la vivado, anateco estas altruismo.

Akiremo (*Lobha*). Unu el la tri fajroj, kiuj devas esti estingitaj por atingi Nirvanon. La deziro akiri kaj posedi estas unu el la plej malbonaj pasioj, al kiuj la homo inklinas. Malpaco kaj konfliktoj daŭras dum la deziro akiri kaj posedi restas neestingita.

Amitajo (*Amitayus*). La Budho de Senlima Vivo. Amitajo kaj Amido estas rigardataj kiel du aspektoj de la Supera Budho, personigante Senfinan Vivon kaj Senfinan Lumon.

Animo (*Citta*). La centro aŭ fokuso de la homa emocio (kion oni ordinare komprenas kiel la econ de la koro), kune kun ĝia intelekta esprimiĝo (komprenata kiel eco de la kapo). La ideo de konstanta senmorta persona animo estas fremda al la Budhismo.

Arahato (*Arhat, Arahat, Lahan, Arakan, Dgrabchompa*). Respektindulo, Sanktulo. Tiu, kiu jam iris la Okeran Vojon, sin liberigis de la dek katenoj, kaj sin purigis de la kvar asavoj; tiu, kiu, je la morto de la fizika korpo, atingas Nirvanon.

¹ Verŝajne la aŭtoro ĉi tie ne havas ĝustan komprenon. Ne estas klare, kion signifas "ĵanaj Budhoj".

Asavo (*Asava*). Ebrieca aŭ nebula stato de la menso. Erariga ideo, kiu malhelpas la menson tiel, ke ĝi ne povas konsideri la veron, nek atingi lumiĝon. La kvar asavoj estas: volupto, avido al la vivo, iluzio kaj nescio. Tuta puriĝo de la asavoj estas la stato de arahanteco.

Avalokitesvaro (*Avalokitesvara*). Personigo de la memgeneranta kreanta potenco de la universo, kiu estas la realo en la homo, kiel en ĉio. Tiu ĉi potenco estas perceptebla per la supera saĝeco de Bodhio, kaj la nomo Avalokitesvaro laŭvorte signifas: «La Sinjoro Vidata.²»

Avido (*Tanha, Triśna*). La soifego por aparta ekzisto, egoisma deziro. Tio ĉi estas citata en la dua el la Kvar Veroj, kun nescio, kiel la kaŭzo de sufero. La «volo al vivado» devas aliformiĝi al bonvolo por ĉiuj estaĵoj. Forigante la avidon al sia aparta ekzisto, oni trovos liberiĝon de sufero en la amo kaj kompato al ĉiuj.

Beatulo (*Bhagavat*). Honortitolo omaĝe al la Budho; Li, kiu estas Beata, Glora kaj Majesta.

Bodhio (*Bodhi*). La povo de percepto aŭ intuicia kono de la Vero. En ĉies koro ĝi estas vekebla, kaj pere de ĝi Lumiĝo stas atingata.

Bodhianimeco (*Bodhicitta*). La stato kiu rezultas el la vekiĝo de bodhio. En tiu ĉi stato la bodhiulo rezignas ĉian posedon, eĉ la propran meriton pro sia bonfarado, kaj tiel praktikas perfektan amon kaj kompaton.

Bodhiarbo (*Ficus religiosa, assattha*). Speco de figarbo. Sidante sub unu el tiu ĉi arboj, bodhio vekiĝis en la animo de Gotamo, kaj li atingis Lumiĝon.

Bodhiulo (*Bodhisatava*). Tiu, en kiu vekiĝas bodhio. Tiu, kies vidado, pro identiĝo kun la Vero, estas perfekte ama kaj kompata. Tiu estas homo, kiu fariĝos Budho, aŭ, laŭ la mahajana skolo, homo, kiu atingis Lumiĝon per bodhio, sed ankoraŭ rezignas la eniron de Nirvano, por ke li helpu la homaron sur ĝia suprenira vojo. Oni ofte nomas bodhiulojn «Budhoj de Kompato», ĉar amo, efektivigita kaj gvidata de saĝeco de bodhio, estas ilia celo.

Bonzo (*Bhikkhu, Bhikshu*). Sanghano. Homo kiu sin dediĉas al la irado de la Okera Vojo, por tio forlasante distraĵojn de mondaj aferoj. Li ricevas sian nutraĵon donace de la

² Eble mistajpo de "Vidanta".

laikoj, kaj kvankam li ne estas devigata redoni ion por la nutrado, li ofte agas kiel instruisto kaj predikisto. Li direktas sian vivon laŭ la Dek Principoj.

Brahma (*Brahma*). Stato de feliĉeco super la ordinara homa stato, kiel ekzemple la vivostatoj sur la braĥmaj vivniveloj. La braĥmaj animstatoj estas atingeblaj per meditado pri amo, kompato, ĝojo kaj trankvilo.

Budho (*Budha, Buddha*). Titolo, kaj ne la nomo de persono, kiu devenas de antikva vortradiko kun la signifo «scii». Budho estas tiu, kiu scias tiel, ke li fariĝas identa kun la plej alte atingebla scio, la Fina Vero. Estis kelkaj Budhoj en la pasinteco (palilingvaj skribaĵoj mencias 24), kaj estos aliaj en la estonteco.

Antivahiko (*Antarabhava*). La stato inter morto kaj renaskiĝo, kiam la karmo, nefunkcianta en materiala korpo, estas en kvazaŭ digesta stato.

Budhano

Budhismo

Celo (*Sankappa*). Prava Celo (*Samma Sankappa*) estas la dua ero en la Nobla Okera Vojo. Ĝi estas la motiva potenco por la irado de la vojo. La vojiranto celas nenion por sia persona gajno, jam konstatinte ke, se li tion celus, li gajnus nur pliigon de sufero. Li celas la bonon de ĉiuj estaĵoj, komprenante, ke ĉiuj kun li estas ĉion ampleksanta Unuaro. Tial li amas ĉiujn, tute same kiel sin mem. Li celas nur tion, kio forigas suferon. Lia frateco kun ĉiuj homoj, kiel kun ĉio, kio vivas, jam estas fakto por li, kaj sur tiu fakto li bazas sian etikon.. Ĉiuj liaj bonaj pensoj, paroloj kaj agoj estas kvazaŭ verŝado de freŝa dolĉa akvo en la riveron de Vivo.

Darmo (*Dharmo, Dhammo*)

Donemo (*Dana*). Unu el la tri bonmeritaj ecoj. La materiala helpado al malriĉuloj kaj tiuj, kiuj spertas malfacilaĵojn; ankaŭ la donado de vivnecesaĵoj al sanghanoj. Donemo, en Budhismo, anstataŭas la oferajn ritojn, en kelkaj aliaj religioj.

Dubo (*Vicikiccha*). Ŝanceliĝo de la menso; necerteco pri la darmo. La dua el la dek katenoj, kiuj estas rompataj sur la vojo al Nirvano. Tiu ĉi estas forigota per medito pri, kaj provado de la darmo en la vivo. Dubo ne estas forigota per la nura akcepto de aŭtoritataĵo. Ĉiu budhano estas aŭtoritato por si, kaj nenia dogmo ekzistas en la religio. Vortoj de sanktaj skribaĵoj, eĉ la diraĵoj de la Budho, ne estas akceptataj nur per blinda kredo. Pro tiu ĉi libereco, budhanoj estas tute toleremaj al malsamopiniantoj.

Abhidarmo (*Abhidhamma*). Analizo, komentado kaj klarigo pri la darmo, la filozofio-scienca de la Budha darmo. La abhidarma pitako estas unu el la dividoj de la kanonaj skribaĵoj de Budhismo, pritraktante la samajn temojn kiel la suta pitako, sed klarige kaj difinante, anstataŭ edifante kaj admonante.

Amo (*Metta*). Praktikata bonvolo al ĉiuj estaĵoj. Unu el la kvar braĥmaj animstatoj. Ĝi estas atingebla per la ekzercado de medito, ĝis ĝi fine fariĝas normala stato de la konscio. Kun la kompreniĝo de la unueco de ĉio, la amo al ĉio vastiĝas, ĝis la korbatoj taktas la ritmon de la Universo.

Fariĝo (*Bhava*). La stato de ekzisto. La deka el la dekdu nidanoj³. Nenio estas; nenio neestas; ĉio fariĝas. Ekzisto estas konstanta fluado, ne kolekto de statikaj eroj.

Formo (*Rupa*). Unu el la kvin komponantaĵoj, el kiuj konsistas ĉiu estaĵo; la limita korpo, aŭ fizika aŭ psika, perceptita de la sentoj. La menso, liberigita de la limigoj de la sentoj, superas la percepton de formo, kaj ekkonas la Senformon.

Budhoformoj troviĝas en multaj orientaj landoj. Ili prezentas statuojn de la Budho staranta, sidanta, aŭ kuŝanta sur la dekstra flanko. La sidantaj statuoj estas la plej oftaj. Budhoformo estas uzata kiel objekto por helpi la meditado. Neniel ĝi estas objekto por la preĝo aŭ diigo.

Gotamo (*Gotama, Gautame*). La familia aŭ genta nomo de la Budho. Per tiu ĉi nomo li plej ofte estas nomata de ne-budhanoj.

Ĝojo (*Mudita, Ananda*). La ekkompreno, ke liberiĝo por ĉiu estaĵo estas atingebla per la darmo; ankaŭ la simpatia ĝojo pro la feliĉo de aliaj. Unu el la kvar braĥmaj animstatoj, atingebla per la ekzercado de medito.

Helulo (*Deva*). Spiritforma estaĵo, bona aŭ malbona.

Hinajano (*Hinayana*). Unu el la du skoloj de Budhismo. La signifo de la originala vorto estis, "la pli malgranda perilo (de saviĝo)." Tiu ĉi signifo ne estas konsiderata kiel esprimo de malestimo, sed kiel indiko de la interpreto de la Budha darmo laŭ tiu ĉi skolo. Ĝi baziĝas sur "malgranda" interpreto, tio estas, filozofia interpreto kun la palilingvaj kanonaj skribaĵoj kiel fundamento. Historie ĝi estis la unua skolo, kaj la

³ Mi ne komprenas, kio estas "nidano". Sed verŝajne temas ĉi tie la dek du branĉoj de laŭkondiĉa estiĝo.

Mahajano evoluis el ĝi⁴. Ĝi ankaŭ estas nomata la "suda" skolo, kaj geografie ĝi ĉefe troviĝas en Birmo, Cejlono, Kamboĝo, kaj Siamo.

Iluzio (*Moha*). Miskompreno bazita sur la erara ideo pri la memo; stulteco, kiu rezultas de nepripensemo. Unu el la tri fajroj, kiuj devas esti estingitaj por atingi Nirvanon.

Ĵano (*Dhyâna*). Stato de super-konscio. Estas ses ĵanaj niveloj. Ili estas periloj por la atingo de Liberiĝo, sed nur en la lasta ĵano la forigo de la iluzio de la memo estas atingata.

Karmo (*Karma*). Faroj, kaj la rezulto de faroj; kaŭzo kaj rezulto, la universala Leĝo. En aplikado al la homa vivo ni trovas, ke faroj, tio estas unuavice mensa aktiveco, kaj duavice la akompananta plenumo de la mesa aktiveco per ago aŭ parolo, kaj la rezultoj de faroj, evidentiĝas kiel homa karaktero kaj la okazaĵoj de la homa vivo. La persona karaktero kaj la okazaĵoj agrablaj aŭ malagrablaj, kiujn ĝi travivas, estas ĉiel rezultoj de la faroj de tiu persono. Tial ĉiu rezultas laŭ sia semado, ĉiu konstruas sian karakteron, ĉiu estas reganto de sia sorto, kaj la ellaboranto de sia saviĝo. Nenia ekstera potenco povas malebligi la fruktiĝon de ies faro. Kiam malagrablaĵo trafas budhanon, li eble dirus, "tio estas mia karmo!" kaj per tiu diro li signifas, ke tion li mem faris, neniuj aliaj ĝin faris, ĝi tute ne estas dekreto de neceso aŭ altrudita sorto.

Oni eniras vivperiodon kiel enformiĝo de karaktero konstruita de la karmo de pasintaj vivperiodoj, kaj, je la fino de vivperiodo, antaŭeniras la karmo de tiu vivperiodo, kune kun la ankoraŭ ne kvitita karmo el antaŭaj vivperiodoj, en la estontecon, por la pli malpli frua efektivigo de rezultoj al la ekzistantaj kaŭzoj, en estonta vivperiodo. Karmo mem ne katenas estaĵojn al sufero. Ĝi estas leĝo kiu nepre funkcias ĝis oni atingas liberiĝon en Nirvano.

Karmo ne estas limita de tempo kaj spaco, kaj ĝi ne estas nur individua. Pro la unueco de la tuta vivformaro, ies faro, reagis sur ĉiu laŭ pli malpli konstatebla grado; ekzemple, familia karmo kaj nacia karmo estas sufiĉe evidentaj.

Komponaĵo (*Skandha*). Kompleksa grupo de elementoj. La kvin komponaĵoj kune formas la aperiĝon de estaĵo. Ili kunestas en ĉiu formaĵo, aŭ aktive, aŭ en dorma stato; ekzemple, konscio eskzistas en ŝtono, sed en neaktiva stato. En la homo ĉiuj kvin komponaĵoj estas aktivaj. Ili estas: (1) formo: en homo, la materiala korpo, fizika kaj etera, inkluzive la nervosistema bazo de inklinoj. (2) sento: la funkciado de la kvin sentorganoj. (3) percepto: kono, aŭ reakcio kaj asimilo de la sento, kaj la elementaj ideoj, kiuj rezultas de senta kontakto. (4) sankharoj: la komparadoj kaj klasifikoj de la

⁴ Pri la deveno de la mahajana skolo estas diversaj opinioj. La aŭtoro skribas, ke la nomo "hinajana" ne havas malestimon nuancon. Sed historie la mahajananoj rigardadis sin pli alta ol "hinajanon". Nun oni evitas uzi tiun ĉi vorton. La suda budhismo estas nomata ofte "theravada".

perceptitaj ideoj; la elementoj, aŭ faktoroj de vinjano, inkluzive la efektivigoj de enformaj tendencoj. (5) vinjano: la uzado, racia kaj instinkta, de la sankharoj; konscio, kiel memkonscio, inkluzive psikaj kaj subkonsciaj procedoj.

Ĉiuj kvin komponaĵoj, ĉu apartaj, ĉu kunaj, estas malkonstantaj suferemaj, kaj anataj. Ili sumigas la tuton de estaĵo. Je la morto ili disiĝas. La sperto, kiun ili akiras, fariĝas parto de la karmo, karmo efektivigas pere de la komponaĵoj, kaj tiel homo rikoltas en sekvantaj vivoj la relultojn de siaj antaŭaj pensoj kaj agoj.

Kateno (*Sanyojana*). Dek katenoj devas esti rompita de la iranto de la Vojo, por atingi liberiĝon. Ĉe la unua etapo de la Vojo li estas rompinta la unuajn tri katenojn: (1) iluzion pri la memo; la falsana ideon, ke la individua memo estas aparta realo en si. (2) dubon; la necertecon pri la celo kaj la direkto de la Vojo. (3) fidon al la efikeco de Ritoj kaj Ceremonioj; la ideon, ke la plenumo de, aŭ partopreno en organizitaj eksteraj formalajoj de diadorado, preĝado, kaj similaj, aŭ ia agado kiu ne baziĝas sur pura altruismo kiu bezonas nenian elmontrandon, povas helpi per si la alproksimiĝon al liberiĝo. Ĉe la dua etapo de la Vojo la katenoj rompita estas: (4) sentemo; la ĝuado de ekscitiĝo de la sentoj, ĉefe ekzemplata per volupto. (5) malbonvolo; malŝato kaj nesimpatio al iu estaĵo. Ĉe la tria etapo: (6) deziro por aparta ekzisto en mondoj de formo; la rigardado de la individua vivo en formo kiel grava stato. (7) deziro por aparta ekzisto en mondoj senformaj; la atendo de paradiza rekompenco aŭ ĉiela feliĉo por la individuo, ĉar tio ankoraŭ estas egoismo. Ĉe la kvara kaj lasta etapo: (8) fiero; memestimo. (9) memaprobo; la ideo, ke la alproksimiĝo al la celo estas afero por memgratulo, tiel rigardante la memon kiel sanktulon. (10) nescio; la radiko de sufero.

Klopodo (*Vayama*). Prava Klopodo estas la sesa ero en la Nobla Okera Vojo. Klopodado estas necesa por atingi liberiĝon. Oni ne povas rajdi al la celo sur la ŝultroj de alia. Estas kvar klopodoj: (1) ne lasi malbonon eniri la menson. (2) forigi malbonon el la menso. (3) plifortigi la bonon en la menso.⁵

La klopodoj unu kaj du ne estas elfarataj per rekta baraktado kontraŭ malbono, sed pere de klopodoj tri kaj kvar. Priatento al malbono nur fortigas ĝin. Oni lasu malbonon, ke ĝi forvelku pro malatento, kaj tial por forigi malbonan penson aŭ kutimon oni kreskigas egalan kaj rekte kontraŭan penson aŭ kutimon bonan.

Kompato (*Karuna, Daya*). Pozitiva simpatio; la kunsuferado kun la suferanta vivantaro. Unu el la kvar braĥmaj animstatoj, atingebla per meditado. La meditado tiel sin identigas kun tiuj, kiuj suferas, ke lia pensado kaj agado ĉiam celas malpliigon de ilia suferado. Nenie li havas motivon por kaŭzi suferon per sia konduto aŭ parolo.

⁵ Mankas ĉi tie klarigo pri la kvara punkto.

Konduto (*Karmanta*). Prava Konduto estas la kvara ero en la Nobla Okera Vojo. Budhismo estas religio de agado, kaj ne de kredo, kaj la saĝeco de bodhio ne estas atingebla nur per la intelekto, sed nepre necesas la plenumo en konduto de ĉiu paŝo de la komprenado.

Konduto ne estas limita de fizikaj agoj, sed de ĝia ekkoncepto kiel penso, eĉ kvakam ĝi ne fruktiĝas kiel faro de la korpo. Ĝi estu regulata de la Kvin Principoj, kaj efektivigu per agado komtaton.

Konstato (*Saddhabala*). La rezulto de esplorado de la darmo. La Budho admonis siajn disĉiplojn, ke ili ne akceptu iun doktrinon kredeme, kaj nur pro la aŭdo de ĝi, eĉ liajn proprajn vortojn, sed plene elprovu ĉion per la racio kaj la sperto.

Kulturo (*Bhavana*). Memevoluiĝo per diversaj rimedoj. Tiu ĉi kulturado kondukas al la kvar braĥmaj animstatoj, amo, kompato, ĝojo kaj trankvilo.

Lamao (*Lama*)

Titolo de la ĉefuloj de la tibetlanda sekto de Budhismo, ankaŭ uzata kiel titolo de iu bonzo de tiu sekto. La ĉefaj lamaoj estas:

La Taŝio-lamao, kiu estas la spirita ĉefulo, kaj rigardata kiel enkorpiĝo de Amido. La Dalaio-lamao, la monda ĉefulo, prizorganto de la rilato inter la religio kaj la ŝtato. La Bogdo-lamao, kiu loĝas ĉe Urga en Mongollando, kaj reprezentas la Taŝio- kaj Dalaio-lamaojn, por la mongolaj budhanoj.

Liberiĝo (*Vimutti, Moksa*). Forigo de ĉiuj katenoj; superiĝo de la limigoj de komponanta ekzisto, per la irado de la Nobla Okera Vojo. Liberiĝinta oni atingas pacon, trankvilon kaj bodhion.

[**noto de la redaktoro de L.O.**]

De la unua numero ĝis la lasta de L.O. ni reaperigis sub tiu ĉi rubriko la ŝatatan “Vortaron de Budhismaj Terminoj” el nia frata gazeto “La Budhismo” kiun redaktas nia agema kunlaboranto S-ro Geo H. Yoxon, kaj ni kredas ke multaj el la legantoj certe konstatis la utilecon kaj la gravecon de lia laboro. Kaj tial ni kompreneble daŭre reaperigas ĝin, sed de tiu ĉi numero ni devas forlasi ŝatatan klarigon de ĉiu termino pro la manko de l’ spaco. Do, estas dezirinde ke tiuj, kiuj volas legi originalan klarigon, turnu vin al “La Budhismo”, en kiu ankaŭ troviĝas valoraj legindaĵoj krom la vortaro.⁶

Mahajano (*Mahâyâna*, 大乘). 仏教の二大部派の一つ。大乘仏教 Mahajana Budhismo、小乗佛仏教 Hinajana Budhismo.

Malamo (*Doŝa, Dveŝa, Krodha*, 瞋恚). 三毒の一つ

Malkonstanta (*Anitya, Anicca*, 無常)

Malpleno (*Ŝunya*, 空). 般若經学の空

Marao (*Mâra*, 魔羅, 摩羅, 魔)

Medito (*Samâdi*). 支那經典に三昧、三摩提、三摩帝、三摩底、三摩地、三昧地等と写され、定 或は等持と訳されている。

Metrejo (*Maitreja, Metteya*). 弥勒慈氏と訳されている。

Morto (*Marana*, 死)

Naskiĝo (*Jâti*, 生)

Nidano (*Nidana*, 因縁, 尼陀那)

十二因縁 (dek du Nidanoj)

1) 無明 Nescio

⁶ Ekde ĉi tie la redaktoro de L.O. aldonas mallongan klarigon en la japana. Por tajpi ilin, mi uzis ne la tradician ortografion sed la nunan.

- 2) 行 Sankharo
- 3) 識 Vinjano
- 4) 名色 Formo
- 5) 六処 Senteblo; Ses sentorganoj
- 6) 触 Kontakto
- 7) 受 Sento
- 8) 愛 Avido
- 9) 取 Volo
- 10) 有 Fariĝo
- 11) 生 Naskiĝo
- 12) 老死 Kadukiĝo kaj Morto

Nescio (*Aviijja*, 無明). 十二因縁の第一、一切の煩惱のこと、この無明のために衆生は永劫生死に流転する。

Nirvano (*Nirovana, Nibbana*, 涅槃, 泥洹). 滅度、圓寂、寂滅等と訳す。無為無作、無生等の種々の称あり、迷妄を脱し、真理を窮めて寂滅無為の法性を究め不生不滅の法身の真証に帰するを云う。佛のさとりのこと。（以下三語浩々洞編佛教辞典に依る）

Okupo (*Ājwa*, 命). Prava Okupo (*Samma Ājwa* 正命) 八正道の第五・出家の法を守り、五種の邪命を離れ、常に乞食して自活すること。

Paramito (*Pāramitā*, 波羅蜜多或は波羅蜜). 度、到彼岸、等と訳す。生死の此岸を渡りて涅槃の彼岸に到るの義。菩薩の衆する行、布施、持戒等の六波羅蜜 (*Ses Paramitoj*) または十波羅蜜 (*Dek Paramitoj*)

Parolo (*Vācā*, 語). Prava Parolo (*Samma Vācā* 正語) 八正道の第三・すべてのいつわりの語を離れること。

Pitako (*Pitako*, 蔵)

三蔵 Tri Pitakoj

經藏：Suta Pitako, 論藏：Abhidharma Pitako, 律藏：Vinaja Pitako

Principo (*Sīla*, 戒)

Kvin principoj (panĉa sīla 五戒)

- 1)不殺生 ne kaŭzi doloron aŭ morton
- 2)不偷盜 ne preni tion, kio ne estas volonte donita
- 3)不邪淫 ne kontuti volupte
- 4)不妄語 ne paroli mensoge
- 5)不飲酒 ne ebriiĝi

Pripenso (*Sati*, 念或は思惟)

Prava pripenso (Sammâ-sati, 正念或は正思惟) 八正道の第七

Rifuĝo (*Saranam*, 歸依)

Tri rifuĝoj:

- Mi prenas rifuĝon en la Budho.
- Mi prenas rifuĝon en la Darmo.
- Mi prenas rifuĝon en la Sangho.

Realo (*Bhutatahata*, 実有)

Saĝeco (*Praĵna*, 般若, 智慧)

Samsaro (*Samsâra*, 轉生, 流轉, 輪廻)

Sangho (*Sangha*, 僧伽). 僧団の意

Sankharo (*Sankhâra*, 行). 十二因縁の第二、五蘊の一

Sensuferiĝo (*Dukha-nirodha*, 滅). 四聖諦の第三、滅諦

Sidarto (*Siddhattha*, *Siddartha*, 悉達多). 釈尊の太子時代の名。一切義成と訳せらる。

Suto (*Sutta, Sutra*, 經). 吾々大乘仏教徒はすべてのVortojを梵語の語根より誘導しがちであるが編者は主に巴利語より誘導している。梵語よりすればSutroである。Suto? Sutro? これも一つの問題である。(S.F.D)

Tathagato (*Tathagata*, 如来). 仏の十号の第一、ekz.阿弥陀如来: Tathagato Amido

Terao (*Thera*, 長老, 上座)

Trankvilo (*Upekkha*, 捨). 慈悲喜捨の捨、心をして平等平安ならしむる精神作用。

Uposatho (*Uposatha*, 布薩). 齋日、設戒日のこと。

Vaso (*Vassa*, 安居). 雨安居のこと、僧侶が雨期の間一定の場所に停まり修行する制度。

Vesako (*Vaiśākha*). La tempo de la plena luno en la monato, kiu interrespondas kun aprilo-majo. En la tago de tiu ĉi plena luno, Vesaktago, oni solenas la naskiĝon, la lumiĝon kaj la forpason de Gotamo la Budho. ベーサカ月、印度の月の名。

Vidpunkto (*Ditthi*, 見). 八正道の第一、Prava vidpunkto 正見

Vinajo (*Vinaya*, 律). Vinaja pitako 律藏

Vojo (*Maggo*, 道). 四聖諦の第四、道諦

Zeno (*Dhyana*, 禪)